

August Graf von Platen-Hallermünde,  
Malofte viaj pensoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Malofte viaj pensoj  
okupas sin pri mi;  
diversas niaj mensoj,  
diverson celas ni.<sup>2</sup>

Mi volus tramigradi  
kun vi tra via land',  
sub tendoj tranoktadi  
kun vi ĉe fora strand'.

Se volas rekompenci  
per am' vi tion ĉi  
poemon, diferenci  
ja ĉesos ambaŭ ni.

*Traduko de la Germana poemo "Du denkst an mich so selten" de AUGUST GRAF VON PLATEN-HALLERMÜNDE (\*1796 – †1835) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1993.*

*MR-260-1a / Arg-62-121 (2003-10-26 00:50:00)*

---

<sup>2</sup>aŭ: alion celas vi.